# Astura Esperanta Asocio reakiras sian nomon

Post la hispana E-kongreso okazinta en Gijón en la somero de 1979 estas en la akt-libro de la Esperantista Grupo Jovellanos nur unu sola akto, la lasta de tiu E-grupo, datita la 31an de decembro de tiu jaro. Por pli bone kompreni kio okazis, ni prefere transkribu la tekston de tiu akto. Jen ĝi:

***Ĉi tiu estas la fina akto de la Esperantista Grupo "Jovellanos". Fine de la jaro 1979 ĉesas ekzisti ĉi tiu grupo. Sekve oni eksplikas la cirkonstancojn, kiuj kondukis al tiu decido. La Esperantista Grupo "Jovellanos" ne havis propran juran identecon sed ĝi funkciadis kiel sekcio dependanta de la Ateneo Jovellanos. Laŭ peto de la Prezidanto de tiu Ateneo oni entreprenis en 1978 la demarŝojn celante enkonduki la Grupon de Esperanto en la Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo. Tiu enkonduko estis atingita kun la incidentoj registritaj en ĉi tiu aktlibro. Sed poste la estraro de la Ateneo Jovellanos, rokonsiderinte sian antaŭan decidon, sin oponis al tio ke la grupo funkcianta en la Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo uzadu la nomon "Esperantista Grupo Jovellanos", ĉar tiu nomo estis ligita al la Ateneo kaj havis neniun identecon for de ĝi. Tiele prezentita la afero estis necese elekti inter:***

***-meti finon al la esperantista agado kadre de la Katedro pri Universitata Disvastigo kaj reveni al la Ateneo, aŭ:***

***-ĉesigi ĉiun ligaĵon kun la Ateneo kaj mendi la leĝan oficialigon de iu nova esperantista asocio.***

***Tial ke oni ne deziris pluajn rilatojn kun la Ateneo Jovellanos kaj, jes ja, kun la Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigo, la membraro de la Esperantista Grupo "Jovellanos" <u>unuanime</u> decidis ne plu ligi sian esperantistan aktivadon kun la nomo de tiu grupo, kiu de tiam havas neniun enhavon ene de la Ateneo, kaj entrepreni la legalizon de iu nova esperantista asocio, por kiu oni povus repreni la nomon ASTURA ESPERANTO-ASOCIO, kiu apartenis al iu asocio kiu ekzistis en ĉi tiu sama urbo antaŭ multaj jaroj.***

Tiele la geesperantistoj de Gijón reprenis la nomon de la unua esperantista asocio ekzistinta en tiu-ĉi urbo… aŭ preskaŭ. Ŝajne neniu rimarkis tiam ke ekzistis iu eta diferenco inter la antikva kaj la nova nomo. La asocio ekzistinta inter la jaroj 1909 kaj 1937 nomiĝis **ASTURA ESPERANTA ASOCIO** kaj tiu, kiun oni entreprenis en 1980, de tiam, ĉiam estis nomata **ASTURA ESPERANTO-ASOCIO**, kaj tiele aperis la nomo en ĉiuj niaj skribaĵoj, en la stampilo de la asocio, en la revuo HELECO, en la flago kiun oni preparis poste… Nur lastatempe, en la lasta statutaro, oni korektis tiun erareton kaj de tiam ni intencas ke ĉiuj niaj presaĵoj kaj emblemoj montru la saman nomon de la unua esperantista asocio fondita en nia urbo antaŭ ĝuste unu jarcento.

**Emblemoj de Astura Esperanta Asocio. Supre tiu de la AEA ekzistinta inter 1909 kaj 1937. Sube tiu de 1980 ĝis nuntempe.**

Por la daŭrigado de nia historio de nun ni devas uzi la aktlibron de la nova asocio. Jen la teksto de ĝia Konstitua Akto:

***En Gijón, estante la 19a horo de la 18a de Januaro de 1980, kunvenas la personoj menciataj paĝo-marĝene, ĉiuj plenaĝaj kaj enloĝantoj de tiu-ĉi urbo, cele konstitui asocion por promocii la divastigadon de la Internacia Lingvo ESPERANTO.***

***Unue oni decidas konstitui tiun asocion kun la nomo ASTURA ESPERANTO ASOCIO.***

***Sekve oni procedas al la elektado de iu Demarŝa Komitato, kiu restas konstituata tiele:***

***-Prezidanto: Santiago Mulas Gallego.***

***-Vicprezidanto: Adonis González Meana.***

***-Sekretario: Faustino Castaño Vallina.***

***-Kasisto: Ildefonso Domínguez Losada.***

***Fine oni procedis ekzameni la projekton de statutaro, kiu restis aprobita.***